**Pliinternaciiĝo de la renkontiĝo en Prenzlaŭ**

Denove invitis Edeltraŭt Henning en sian urbon, nome al Prenzlaŭ, kaj esperantistoj el Finnlando, Pollando, Bavario, Meklenburgio-Antaŭpomerio, Berlino kaj Brandenburgio sekvis la vokon al la Schützenhaus (pafista domo)-restoracio. Kunvenis 16 personoj. Post kelkaj klarigoj ni eĉ ricevis propran ĉambron, ke ni ne ĝenu aliajn gastojn aŭ reciproke. Ĉifoje la prezentado de diversaj literaturaĵoj estis grava programero. I.a. prezentiĝis la libroj de Roman Dobrzyński „Bona Espero“ kaj „La Zamenhofstrato“, sed ankaŭ diversaj distraĵoj. Fine Ronald Schindler prezentis la libron “Germanaj bieroj kaj bierkulturo” de Harald Schicke. Okaze de tiu prezento okazis eta ekspozicio pri germanaj kaj diversaj eksterlandaj bieroj kune kun plej diversaj hanapoj kaj glasoj. La prezento daŭris iomete longe kaj estis sufiĉe seka, ĉar ne eblis gustumi la bierojn en la restoracio pro kompreneblaj kaŭzoj. Tamen tiu aŭ jena botelo ŝanĝis la posedanton.
Post tre bona tagmanĝo kaj adiaŭo de la jam nun pluenvojaĝintaj finnaj gastoj ni komune iris al la konata monaĥejo de dominikana ordeno. Tie troviĝas tre interesa muzeo kaj enkorta koncertejo. Dank’ al Edeltraŭt ni havis lertan ĉiĉeroninon, kiu ne nur bone klarigis, sed ankaŭ alproksimigis al ni la ŝanĝoplenan historion de la konstruaĵo kaj de la urbo.
Sekvis eta rondiro al la centro de Prenzlaŭ, de kie ni i.a. povis vidi la ekkonilon de la urbo, la konstruaĵon de la preĝejo de St. Maria. Tra bela enurba parko ni denove atingis la Pafistan Domon kaj ĝuige kafumadis. Baldaŭ necesis adiaŭi unu post alia gasto por la parte longaj hejmvojaĝoj.
Ĉar multaj samideanoj bedaŭris, ke ili ne povis veni, ĉar la aranĝo okazas en la mezo kaj ne en la fino de la semajno, estas pridiskutenda, ĉu oni sekvontfoje ne renkontiĝu sabate.

Ronald Schindler